

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 5/2002



*Kiusankappaleita 1 de M A Numminen, eldonita en 2000, enhavas entute 63 kantaĵojn sur du kompaktdiskoj. La 14a kantaĵo sur la A-disko nomiĝas Kun mia virino en la parko de nia parlamento. Ankaŭ pri ĝi M A Numminen donas klarigon en la KD-kajero: La disko estis eldonita pro mendo de Esperanto-Asocio de Finnlando en 1968 kaj disvastiĝis tiuvoje en la mondon. Al la artisto tamen mankas informo pri la akcepto. (Foto: Anna Ritamäki)*

**M.A. Numminen, p. 4 ♦ Aŭtunaj Tagoj, p. 10**  
**Informoj pri Gotenburga UK, p. 20 ♦ Kuirejaj vortoj, p. 26**



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo:** ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritämäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritämäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 13,50 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritämäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**

*Anna-Liisa Heikkinen*, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ annaliisa.heikkinen@surfeu.fi

*Eila Martin*, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

*Synnöve Mynttinen*, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

*Jukka Noponen*, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**

*Irja Miettinen*, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ (05) 453 0653 ✉ irja.miettinen@WWnet.fi

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Officejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>

## Kion faru EAF por subteni ordinarajn kaj eksterordinarajn atingojn?

Feliĉe konstateblas ke nia gazeto estas legata. Leginte miajn pasintnumerajn prezidantajn pensojn la poŝtiganto kaj kasisto reagis. Nun necesas pli profunda analizo, sed mi komencu per kelkaj informoj.

La preskostoj por la tri unuaj numeroj variis inter 270 eŭroj (20-paĝa numero) kaj 420 eŭroj (32-paĝa), la poŝtkostoj inter 157 kaj 180 eŭroj. Ĉiu numero estis sub-50-grama, la plej dika numero pro uzo de malpli dika papero. La tria numero kostis poŝtkoste malpli pro tio ke la nepagintoj de siaj kotizoj tiun numeron ne ricevis. Konsiderante la edukministrejan subtenon de 1000 eŭroj kaj la abonkotizojn la gazeto praktike financas sin mem. Nia financa situacio permesus ankoraŭ okazigon de kunsido por la redakta grupo, malnova ideo, kiu ĝis nun ne realiĝis. Eble la vendredo antaŭ la Vintraj Tagoj estos la ĝusta momento por tio.

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando kunsidos en Kimito la 9an ĝis la 10an de novembro. Invititaj estas ankaŭ du reprezentantoj de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo kaj la ĉefdelegito de UEA. Per tiu semajnfina kunsido ni celas atingi ke ni mem pli bone komprenu niajn proprajn fortojn kaj malfortojn kaj surbaze de tio pli bone komprenu niajn ŝancojn atingi progreson en nia asocio kaj por Esperanto ĝenerale. Speciale ni atentus la financon flankon.

Se ĉio bone pasos dum la semajnfino ni ankaŭ ekhavos klaran ideon pri ampleksa evoluoprojekto. Ni volas fari ion eksterordinaran, kio samtempe fortigas la fundamenton de nia asocio. Ni jam ideumis pri plikvalitigo de nia informa aga-

do, sed ni bezonas financon subtenon, kaj ni devas pripensi tre bone kion ni volas atingi kaj kiel. Viaj ideoj estas tre bonvenaj.

Esperable EAF povos pli forte ol ĝis nun subteni la iniciatojn de siaj membroj, videbligi la jamajn bonajn evoluojn. Ni ja ofte spertas bonajn surprizojn! Subite ni povas konstati ke en Finnlando ni ne nur havas kantemajn longtempajn klubaninojn, sed ankaŭ esperantlingvan umuzikbandon kaj operkantistinon. Ni havas amuzsporteman FEJO:n. Esperarto logas al naturumado kaj ĉevalrajdado. Arbaro de Zamenhof allogas al esperantlingva vilaĝo. Verŝajne baldaŭ nialande eldoniĝos esperantlingva kuirlibro. Ĵus mi eksciis ke pretas manuskripto de porjunulara libro .... Eksterordinare estas ankaŭ ke nia propra Esperanta Finnlando povas prezenti artikolojn pri la stelaro sur nia norda ĉielo.

Ordinara estas la aperado de nia gazeto, sed la pasinta numero aperis en eksterordinaraj cirkonstancoj. Nia presejo en Jyväskylä brulis kaj en la presejo brulis ankaŭ la originalo de nia gazeto. La redakta grupo ricevis la novaĵon vendrede la 9an de aŭgusto. Ilkka Santtila sendis novan originalon al Pentti Makkonen, kiu ricevis ĝin lunde la 12an de aŭgusto kaj tuj portis ĝin al Pica-paino. Jam marde posttagmeze la pretaj Esperantolehti troviĝis sur lia sojlo. Li kontente konstatis: "Pica-paino vere estis Pika-paino". (Pikapaino = rapidpres)

Ekster la fenestro staras arboj kun folioj – kaj neĝo. Estas eksterordinara oktobro.

Aŭtunvintrajn salutojn de via prezidantino

*Anna Margareta*

## MA Numminen intervjuo

E-lehti renkontis MA Numminen retrošte. Li afable konsentis pri intervjuo. La tasko intervjui lin ŝajnis al mi tamen terurege malfacila. Kion demandi de persono, kiu de jardekoj estas muzikisto, kulturadikalo, verkisto, aktoro, fenomeno, studinto de eskimaj kaj bantuaj lingvoj, filozofio, ĝenerala lingvistiko, bieramanto, havas konekton al esperanto...ho ve!

*Riitta: Olet ollut olut-seuran puheenjohtajana sekä ”Baarien mies”-kirjoittaja: Kumpi on parempaa Lambic vai sahti?*

MAN: Sahti on erityinen juhla juoma, sitä saan siis harvoin.

*Riitta: Voisitko suositella E-lehden lukijakunnan syysrientoihin mielenkiintoisimman pikku baari/nautintoa-aine-kombinaation?*

MAN: Helsingin ajanviettopaikoista voin suositella niin sanottuja kalaravintoloita, esimerkiksi Janoista Lohta. Savonlinnassa suosikkipaikkani on Olutravintola Sillansuu. Turussa Seurusteluravintola Apteekki ja ravintolapanimo Koulu. Tampereella vaikkapa Pikilinna ja Plevna. Joka paikassa aloitan illan belgialaisella oluella.

*Riitta: Oluesta siirtykäämme yliopistolle. Aineyhdistelmäsi yliopistolla oli vaikuttava ja hengästyttävä. Kuinka päädyit bantu- ja eskimokieliin?*

MAN: Yleistä kielitiedettä ja filosofiaa lukiessani kiinnostuin ihmisten tavoista ilmaista aikaa. Sekä bantu- että eskimokieliissä esimerkiksi preesens ja imperfekti poikkeavat viehkeästi länsieurooppalaisten

M.A. Numminen



M.A. Numminen

kielten aikamuodoista.

*Riitta: Kuinka?*

MAN: En millään muista 40 vuoden takaisia opintojani, joten siis keksin esimerkin. Jos preesens on gacas, niin imperfekti on kurucu (c äännetään kuten esperantossa).

*Riitta: Et kuitenkaan valmistunut, vaan musiikki vei mennessään. Liittyikö köyhäksi muusikoksi ryhtymiseen suurta päätöstä ja heittäytymistä vai tapahtuiko hiljainen liukuma?*

MAN: Tapahtui liukuma. Kun huomasin olevani ”pop”, en malttanut olla käyttämättä tilannetta sosiologiseen havainnointiin. Kokemuksistani on ollut myöhemmin hyötyä nuoremmille sosiologeille.

*Riitta: Entä aijotko valmistua vielä?*

MAN: En aio, enkä varsinkaan aijo. Ehdin saada noin kuuden vuoden aikana yliopistossa niin hyvän koulutuksen, että olen tyytyväinen. Titteliä en kaipaa.

*Riitta: Monet ihmiset kiinnittävät huomiota vain ääneesi, eivätkä musiikkiin, muusiikkoon, taitoon, pitkään ja upeaan uraan. Eikö se närkästyttä sinua lainkaan?*

MAN: Ei närkästyä. En voi olettaa jokaisen olevan selvillä urani kaikista puolista. Ne tietävät, jotka ovat harrastaneet Nummisilmiötä. Muut saavat poimia minusta, mitä haluavat.

*Riitta: Kerro äänesi tarina. Oletko siis to-sissasi vai onko kyseessä parodiaääni? Mitä kuulostaa ei-parodiaäänesi?*

MAN: a) Jos joku luulee minun olevan to-sissani, kehotan häntä käymään kallonkustitajalla. b) Yksi kuuluisimmista levytyksistäni on ”Olen nähnyt Helga-neidin kylvyssä”. Siinä ei ole yhtään narahdusta.

*Riitta: Mikä oli yleisön reaktio ekoilla keikoilla?*

MAN: Yleisö oli ällistynyt.

*Riitta: Yhteiskunnan närkästyttäminen on ollut kantavia aatteitasi. Kerro paras närkästyttämiskokemuksesi.*

MAN: Paras kokemukseni on Bulgarian nuorisofestivaalista Sofiassa 1968. Kysymyksessä oli kansainvälinen gaala-ilta, johon jokainen maa oli lähettänyt mahdollisimman hyvän taiteilijan. Kun minun esitystäni oli kestänyt noin 15 minuuttia, satoja ihmisiä alkoi poistua loppuunmyydystä 4000 hengen konserttisalista. Johtaja tuli keskeyttämään konserttini. Lehdistö, joka uteliaasti tuli haastattelemaan minua, ei saanut kirjoittaa asiasta riviäkään.

*Riitta: Millaiset asiat sitten nyky-yhteiskunnassa saavat aikaan pyörtymisiä, kauhun kiljahduksia ja suurta hämmennystä?*

MAN: Samat vanhat asiat kuin aina ennenkin. Jos sekoittaa sopivasti uudelleen seksin, uskonnon ja politiikan, kauhustusvaikeus on varma. Teho tosin laimenee nykyisin pika-ajassa.

*Riitta: Millainen on yleisösi?*

MAN: Yleisöni ulottuu päiväkodeista eläkeläisjuhliin ja kansankapakoista diplomaattikutsuihin.

*Riitta: Kuinka syntyi mainio kokoelmalevy ”Kiusankappaleita”?*

MAN: Kaksi nuorta miestä, Mikko Ilanko ja Juha Nikulainen, ehdottivat minulle kaikkien single- ja erillisäänitteideni kokoamista levysarjaksi, koska vanhojen pikkulevyjeni löytäminen on lähes mahdotonta. Kuukaan ei arvannut, että kokoelma paisuisi kolmeksi kaksois-CD-albumiksi.

*Riitta: Kun tutkii Kiusankappaleita-levyä, huomaa, että olet tehnyt lukuisia tilausbii-sejä. Kuinka ihmeessä olet päätenyt tekemään niin monia tilaustöitä mitä omituisimmille tahoille: Munakunnalle, urheiluseuroille, Mannerheimin Lastensuojeluliitolle, Esperantoliitolle?*

MAN: En ole itse päätenyt tekemään tilaustöitä. Olen tehnyt, koska on tilattu.

*Riitta: Minua viehättää erityisesti Munakunnan tilaama pääsiäislahja asiakkailleen. Kerro siitä jotain.*

MAN: Vientikunta Muna oli poikkeus tilaustöissä. Menin itse tyrkyttämään sinne kananmuna-aiheisia laulujani, jotka olin suomentanut saksasta. Ilokseni Muna tilasi singlen kaikille asiakkailleen pääsiäislahjaksi.

*Riitta: Esperantoliitto puolestaan tilasi ”Kun mia virino...”-sinkun ilmeisesti vuoden 1969 maailmankongressiin Helsingissä? Kerro, kuinka homma meni.*

MAN: Esperantoliitto tilasi ensisijaisesti singlen a-puolella olevan laulun, YK:n ihmisoikeuksien julistukseen sävelletyn lau-

lun, ”Ĉiuj homoj”. Laulu oli ilmestynyt suomeksi kaksi vuotta aikaisemmin. Solistina, myös esperantoksi, esiintyy Päivi Paunu. B-puolelle Vilho Setälä, leikkisä mies kun oli, ehdotti ”Kun mia virinoa”.

*Riitta: Esiinnyitkö livenä tuossa kongressissa?*

MAN: Olin aivan liian radikaali vuonna 1969, jotta minut olisi kutsuttu esperantistien maailmankongressiin.

*Riitta: Millainen vastaanotto sinkulla oli?*

MAN: Vilho Setälä kertoi minulle kansainvälisen yleisön ihmetelleen, miksi kauniin laulun parina oli hyvin omituinen tango.

*Riitta: Kuinka muuten ryhdyit tekemään lastenmusaa ja jänikseksi ja yhdeksi lapsuuteni pelottavimpia hahmoja Lumikin noidan lisäksi (Herra Huu)?*

MAN: a) Yleisradion lastentoimitus tilasi minulta vuonna 1970 kuusi lastenlaulua. Niistä tuli suosittuja, ja niitä haluttiin lisää. Ryhdyin siis sillekin alalle. b) Ohjaaja Jaakko Talaskivi halusi tehdä elokuvan Herra Huusta. Kirjailija Hannu Mäkelä, jonka luo-



mus Herra Huu on, suostui sillä ehdolla, että minä näyttelisin pääosan. Jäniselokuvat ovat TV-1:n lastentoimituksen tilauksia.

*Riitta: Sinulla on suuri suosio erityisesti Ruotsissa ja Saksassa. Mitkä ovat alunperin Ruotsi- ja Saksa-yhteytesi? Miksi saksa on läheinen kieli?*

MAN: a) Tilanne oli 40 vuotta sitten sama kuin nyt: hyvin harva osasi muuta vierasta kieltä kuin englantia. Ruotsin opettelin kunnolla suomenruotsalaisten kulttuuriystävieni vuoksi, jotta minun läsnäoloni ei olisi aiheuttanut kiinnostavien keskustelujen tyrehtymistä. Saksan opettelin voidakseni keskustella itäeurooppalaisten taiteilijoiden kanssa; he eivät nimittäin saaneet opiskella englantia koulussa.

b) Olen pitänyt saksan kielestä lukioajoista alkaen, jolloin luin sitä lyhyen oppimäärän verran. Yliopistoaikoinani päätin nostaa taitoni riittäväälle tasolle. Kun minusta tuli laulaja 26-vuotiaana, otin oitis myös saksankielisiä lauluja ohjelmistooni. Kaunokirjallisen tekstin kirjoittaminen saksaksi virkistää aivojani. Ja onhan saksa oikein hyvä vaihtoehto liialliselle angloamerikkalaisuudelle.

*Riitta: Olet tehnyt melkein kaikkea mahdollista jazzista lastenmusiikkiin teknoon rockiin tangoon ja jenkkään... Mitä musalajia et ole etkä halua?*

MAN: Koetin jo lukioaikoinani opetella siemämään sinfoniaorkesterilla esitetyjä iskelmä- ja viihdekappaleita. En oppinut, vaikka pari vuotta kovasti yritin.

*Riitta: Miltä monipuolisesta kulttuuriradikaalista näyttää nykyinen suomalainen musamaailma tarkkoine karsinoineen ja formaattibändeineen?*

MAN: Olen lähinnä pahoillani, että nyky-

nuoret eivät saa helpolla tavalla kuunneltavakseen musiikin eri muotoja. Kiinnostuneen täytyy nykyisin ponnistella rajusti voidakseen nauttia esimerkiksi sellaisesta musiikkitarjonnasta, joka oli 1970-luvulla kaikille mahdollista.

*Riitta: Kuinka? Mikä oli siis toisin?*

MAN: Yleisradion muutamalta kanavalta tuli erittäin monipuolisia musiikkiohjelmia sekä suomen- että ruotsinkieliseltä puolelta. Ei ollut helppoa valita vain omaa mielmusiikkiaan, vaan sitä piti odottaa. Odotellessa tuli kuunnelleeksi myös muunlaista tarjontaa.

*Riitta: Herätät samalla kunnioitusta ja angstia: Kuinka on mahdollista, että yksi ja sama ihminen opiskelee kansantaloutta, filosofiaa, kielitiedettä, tekee laajalla skaalalla musaa, elokuvia, kirjoittaa ja on lisäksi jänis?*

MAN: Joku minua viisaampi on todennut minun syntyneen renessanssi-ihmiseksi. Ei sellainen voi pursuavuudelleen mitään.

*Riitta: Millaisia tulevaisuuden suunnitelmia sinulla on?*

MAN: Tulossa on paljon kirjoja ja musiikkia, jonkin verran myös elokuvia.

*Riitta: Hiljattain simulta ilmestyikin kirja, eikös?*

MAN: Keväällä ilmestyi runovihkon ja CD:n käsittävä teos nimeltään ”Rytmirunoja”. Siinä on runoja suomen lisäksi myös muilla kielillä, esperantoksikin. Syyskuussa ilmestyi aivan uuden tyyppinen kirja, ”Naapuri”, jonka olen kirjoittanut yhdessä vanhojen underground-ystävieni Markku Innon ja Jarkko Laineen kanssa. Luultavasti sohaisemme esteettistä muurahaispesää.

*Riitta: Kun kirjoitat, liittyvätkö eri kielet selkeästi tiettyihin mielialoihin ja -tiloihin? Esim. milloin koet halua kirjoittaa juuri saksaksi tai – E-lehden toimittajana en voi olla kysymättä – esperantoksi?*

MAN: Esperantoksi kirjoitan lähinnä huvitakseni itseäni ja hämmästyttääkseni muita (esperantisteja on niin vähän kuulijoissani ja lukijoissani, etten suuntaa tekstejä erityisesti heille). Saksaksi kirjoitan sen vuoksi, että se todella laajentaa ilmaisuani. Suoraan saksaksi kirjoitetusta tekstistä tulee väijäämättä erilaista tunnelmaa, suorastaan toisenlaista kaunokirjallisuutta.

*Riitta: Mitä musaa kuuntelet?*

MAN: Eniten kuuntelen klassista musiikkia, sen jälkeen jazzia. Muita musiikin lajeja, kuten tangoa ja bluesrockia, kuuntelen satunnaisesti.

*Riitta: Oletko koskaan kuunnellut itsesi lisäksi muita esperantoksi esiintyviä artisteja?*

MAN: Minulla on kotona muutama esperantoksi tehty levy. Eniten olen radio-ohjelmisissa soittanut San Fransiscosta kotoisin olevan IXNA-yhtyeen levyä ”Mi ne parolas”.

*Riitta: Esperantisteja kiinnostaa myös millä tolalla on esperantosi? Puhutko esperantoa?*

MAN: Ilmaisukykyäni esperantoksi on taantunut kuten myös ranskan-, venäjän ja viron taitoni. Tämä johtuu siitä, että työskentelen hyvin paljon ruotsiksi, saksaksi ja englanniksi. Minulle ei jää enää aikaa harrastella kieliä, joilla ei ole käyttöä työelämässä.

*Riitta: Sinulle esperanto oli oppiaine koulussa. Millaisia kokemuksia ja muistoja sinulla on siitä? Haluaisitko esperanton ole-*


*Esperanto diskovendeje:*

**M.A.Numminen kun mia virino en la parko de nia parlamento!**

## **M.A.Numminen/ Kiusankappaleita 1**

*Love Records/2000*

En 2000 aperis duobla KD *Kiusankappaleita 1*, kiu estas kompilaĵo el disketoj kaj diversaj specialaj surbendigaĵoj de M.A. Numminen el la jaroj 1966-1973. La diskoj enhavas furoraĵojn kiel *Kissa viekoon* kaj *Olen nähnyt Helga-neidin kylvyssä*, sed ankaŭ plurajn vere rarajn pecojn malofte aŭditajn.



Laŭ la kompilantoj Mikko Ilanko kaj Juha Nikulainen kelkaj el tiuj raraĵoj eĉ perdiĝis kaj nur antaŭ ne longe retroviĝis.

Por esperantistoj interesa informo estas, ke en la sama KD troviĝas ankaŭ la esperantlingva *Kun mia virino en la parko de nia parlamento* inter pecoj finnaj, anglaj, germanaj kaj italaj. La esperanta versio estis mendita de EAF kaj aperis en 1968. Laŭ la diskokajero mankas informoj i.a. pri la tradukinto kaj pri la reagoj, kiujn la kanto vekis en esperantistaro internacie. Ĉu iu plu memoras kaj ion scias prie?! La kompilantoj aprecus ĉi informojn.

Apartan spicon donas al ĉi KD ĝuste la diskokajero, kiu suke rakontas al ni pri la fono de la peconaskiĝoj. Laŭ la kajeraĵoj pluraj kantoj estas menditaj de plej neatenditaj direktoj kiel *Korkeushyppy-yhdistys Rimaralli*, *Raittiuden Ystävät ry* aŭ la studenta asocio de la helsinka universitato, *HYY*. La pecojn *Papukaijani ei syö kovia munia* kaj *20 muna päivässä* oni duondevige altrudis al la firmao *Munaosuuskunta*, kiu aĉetis la ovdisketon kaj ĝin disdonis paskoprezente al siaj klientoj. La MA-aj kantoj ankaŭ kaŭzis pli ol unu foje skandalojn. La finna originalo *Naiseni kanssa eduskuntatalon puistossa* kaj kelkaj aliaj pecoj preskaŭ kondukis M.A. Numminen karceren

▷ *van pakollinen tai valinnainen oppiaine kouluissa, kun sillä selkeästi ei ole käyttöä työelämässä?*

MAN: Nykyisin käydään ankaraa keskustelua pakkoruotsista (niin kuin ei mikään muu aine koulussa olisi pakollinen). Luulen että

esperanton pakollisuus nostattaisi vielä enemmän karvoja pystyyn. Sen sijaan valinnaisena aineena se saattaisi alkaa levitä kaikkien kunnan snobeiksi kasvavien keskuuteen.

*Riitta: Koran dankon pro la intervjuo!*

**Pliaj informoj pri M.A Numminen troviĝas en: <[www.ma-numminen.net](http://www.ma-numminen.net)>**



dum ili estis prezentataj en kabareto en Jyväskylä. Medicinstudentoj mendis de M.A. priseksajn pecojn por speciala seksonumero de la revuo *Medisiinari*. Eksplodis skandalo kaj sekve centoj da kuracistoj malabonis la revuon. Kiu en la finna muzikmondo havus simile buntan, strangan kaj unikan karieron!

M.A. Numminen ja estas muzikisto, kiu dividas la opiniojn al du klaraj kategorioj. Lian voĉon, stilon kaj muzikon oni aŭ opinias genia aŭ malamegas. Tiel la muzikon mem mi ne tuŝos, eĉ ne sub la titolo *Muzike*. La fanoj komprenas, pri kia bonega frandaĵo jen temas.

*Riitta Hämäläinen*

## Kun mia virino en la parko de nia parlamento

*(M.A. Numminen)*

– Fragmento kaptita el la disko –

*”Mi sidis kun mia virino  
en la parko de nia parlamento.  
Ni rigardis kiel la parlamentanoj  
pasis nin grupe.  
La dekstruloj  
uzis la dekstran randon de la vojeto.  
Mia virino diris,  
donu al mi pli  
da malforta, blanka vino.  
Mi donis.  
Efektive, ambaŭ ni malmulte drinketis.  
Poste mi vortumis:  
Nun mi dezirus manipuli vin.  
Ŝi konsentis.  
En la publika loko, ni ne, kompreneble,  
estis tro kuraĝaj...”*

## Persone: Sen

*(Vinilkosmo)*



La plej fama eo-rokbando Persone malkonektis la kablojn kaj finfine registris sian longe-pri-parolitan senelektran albumon. Bedaŭrinde akustikaj diskoj estas vere malfacila ĝenro en popularmuziko. En la 90-aj, muzik-kanalo MTV tamen sukcesis produkti furoraĵojn kun sia longa serio da ”unplugged”-diskoj, kun pintaj nomoj de Nirvana ĝis Roxette; kelkaj ankoraŭ ludataj kiel klasiko en radiostacioj ĉirkaŭ la mondo. Eble unu kialo por malsukceso de Persone atingi saman ”senŝtopitan”-etoson estas tio ke la MTV-diskoj estas registritaj intime antaŭ viva publiketo, sed *Sen* nur en ŝvita studio. Mankas cetere violonoj, sonoriloj kaj kiaj ajn ekstraj aranĝideoj escepte de basviolono de Anders. Kelkaj pecoj bonas, almenaŭ la novaj *Pli ol nenio* kaj *Sola en vaku’*, sed la plej bonan etoson havas malnovaj akustikaĵoj aldonitaj: *Lasu min sonĝi* kaj *Nun malmumas ekstere*. La interaj trakoj estas lacigaj kaj taŭgus plej bone kiel memoraĵo por la bandanoj mem kaj iliaj familianoj.

La estonteco de Persone estas malcerta ĉar nuntempe la anoj loĝas ĉiuj en diversaj urboj, Martin daŭre en Svedio sed Bertilo kaj Anders en Germanio. Dum sia longa kariero Persone neniam sukcesis fari tute bonan albumon, do estas granda domaĝo se *Sen* restas la lasta eldonaĵo de ĉi splenda koncertbando – akustike kaj elektrike.

*Patrik Austin*

## Sukcesaj Aŭtunaj Tagoj en hejma etoso

Ni trovis nin en hejme en la Esperantujo de Taivalkoski dum la Aŭtunaj Tagoj de EAF 21-22 septembro 2002. En nia pli ol 60-persona grupo troviĝis ankaŭ deko da lokaj mastrumantoj de nia bonfarto. Ni ankaŭ renkontis plurajn elstarajn lokajn agantojn, kiuj kvankam ne scipovantaj paroli nian lingvon, estis bone informitaj pri ĝi. En Taivalkoski ni povis senti nin varme akceptataj.

Inter niaj gvidantoj elstaris la tre konataj Osmo Buller, kiu post siaj jaroj en la Centra Oficejo transprenis la gvidadon de la kultura vivo de Taivalkoski kiel estro de la Pääta-

lo-instituto, kaj Aini Vääräniemi, kiu agas ankaŭ kiel vilaĝestro de Arbarvilaĝo (oficiale Metsäkylä) kun sia Arbarbar-kafejo kaj Vilaĝvendejo kun poŭtservoj. Ĉiujn menciitajn lokojn ni vizitis, kaj ankoraŭ pliajn, ĉar Taivalkoski estas vasta komunumo, kaj niaj Aŭtunaj Tagoj estis moviĝantaj.

Ni ĉiuj manĝis kaj iuj de ni dormis en la malnovstila feriejo Saija, kie ni ankaŭ spektis la filmon Reveno al Finnlando, kiu temas pri la sorto de pola militkaptito en Taivalkoski. Multaj lokoj de la libroj de Kalle Päätalo iĝis konataj interalie per vizito al lia in-



*“Vilaĝvendejo kun poŭtservoj”. Tie ĉi ni povis ricevi esperantlingvan priservadon de la vendejestro Sulo Kaijala. Samdome ni ankaŭ kafumis en Arbar-bar. Sur la foto Reima Rannikko kaj Pentti Makkonen kun Osmo Buller. Dekstre Aini Vääräniemi kaj sur la ŝtuparo i.a. Arpad Csanyi. (Fotis Saliko)*

fanaĝa hejmo Kallioniemi, kaj post kafumado kaj esperantlingva aĉetumado en Metsäkylä ni spertis ankaŭ la Arbaron de Zamenhof kaj elektis tie Arbon de EAF. Apude nin invitis du domoj: muzea kaj esperantolibra ekspozicioj.

La sabatan vesperon ni pasigis en la lernejo de Metsäkylä. Ni spertis kantoprezentojn de la loka grupo kun partopreno ankaŭ de multaj infanoj, kaj Anja Karkiainen kaj Lauri Liukkonen kontribuis poeme kaj kante, ankaŭ kunkantige. Tuomo Horsma, prezidanto de la komunuma estraro, salutis la partoprenantojn nome de la komunumo Taivalkoski.

Dimanĉon ni pasigis en Hotelo Taivalvaara startante la tagon kun matenpreĝo okazigita de Kristana Esperanto-Ligo de Finnlando. Ĉeestis ankaŭ la loka paroĥestro. La temon "Pensu globe – Agu loke!" ni pri-traktis interŝanĝante spertojn surbaze de informoj pri la membroasocioj de EAF kompilitaj de vicprezidanto Päivi Saarinen kaj sekretario Tiina Oittinen. La publiko povis aldoni multajn interesajn informojn. Osmo Buller pensigis pri pliaj agadeblecoj pere de teksto de Joachim Werdin el la nove aperinta krestomatio Vojaĝo en Esperanto-lando de Boris Kolker. Krome li montris al ni ankaŭ ekzempleron de eta finningva libro kun la nomo Esperanto. Temas pri novelkolekteto de Eero Suvilehto. Unu el la noveloj temas pri bulgara esperantistino, kun kiu la aŭtoro konatiĝis dum sia multjara restado en Bulgario. En la libroservo bone vendiĝis la nova Plena Ilustrita Vortaro.

Ni konatiĝis kun la teretaĝe situanta Pääntalo-instituto, kiu interalie okazigas la konatan fabelkonkurson por infanoj. Unu semajnon antaŭ la limdato alvenis naŭ konkursaĵoj por la esperantlingva branĉo. Espereble ni

trovos manierojn plimultigi la partoprenon en estonteco, ĉar estus vera perdo, se la esperantlingva branĉo malaperus pro manko de sufiĉa interesiĝo. Lunĉon ni manĝis en Jאלava, la verŝajne plej malnova – kaj malnovstila – funkcia vilaĝvendejo en Finnlando. Ĝi estas fondita en 1883.

La radio kaj gazetaro vaste raportis pri la aranĝo. Jam en la aŭtobuso de Oulu ni povis dufoje aŭskulti en Radio Suomi de la Oulu-regiono intervjuojn kun partoprenontoj, kun lokaj esperantistoj kaj kun frue alvenintoj. Dimanĉe la prezidanton de EAF Anna Ritämäki telefone intervjuis ankaŭ la diĝita radio Aino, aŭskultebla ankaŭ analoge en Helsinko. Kaleva raportis dimanĉe, Koillissanomat lunde kaj Suomenmaa marde. Pluraj gazetoj publikigis antaŭinformojn senditajn de Osmo Buller.

(amr)



## La Fortaleza UK: Inspiris la bela sonĝo de l' (h)omaro

“*Mia Brazilo brazila  
Ritmado multperkutita  
Brazil’, por mi, Brazil’, por mi ...*”  
(Akvarelo de Brazil’ de Ary Barroso,  
tradukis Tarcísio Lima)

sonis en la malfermo kun vigla partopreno de la publiko, en la arta vespero kunkantata kiel triumfo de la ĉi-jara internacia ĥoro kaj ankoraŭ en la fermo de la 87a Universala Kongreso de Esperanto... kaj daŭre ĝi sonas en la memoroj de ni kunĝintoj. Ni sentis la ritmojn, la freŝecon kaj la fascinon.

La nord-orienta brazila urbo kun la belegaj plaĝoj kaj plaĉa varmego mildigita de la oceana vento kaj akompanata de la ĉiam agrablaj brazilanoj donis al la ĵus pasinta kongreso (3-10 aŭg) apartan karakteron. Pli ol 800 aliĝintaj brazilanoj eksterordinare formis kongresanaron kun unulanda majoritato, kongreson kun ĉie ĉeestanta gastamo.

Tiu granda grupo alvojaĝinta de la tuta vasta lando sentebliis de tempo al tempo kiel forta ak-lamo en la salono. Tiel la brazilanoj salutis siajn lokajn heroojn, la Lokan Kongresan Komitaton, kaj la artistojn je la tonoj de siaj amataj kantoj. Nun tiuj kantoj pli forte apartenas al ĉiuj ni, pli integrite en nia esperantisma kanta trezoro. Plaĉajn memorojn vekas la mardvespera koncerto de brazilaj E-muzikistoj: Tarcísio Lima, Flávio Fonseca kaj la bando *Merlin*, kiu alvokis similan publikreagon kiel la jam pionira *Persone* en Eŭropo.

La ĉeestintoj de la nacia vespero rakontis pri mirinda travivaĵo, pri karnavala etoso. Kontentigis ankaŭ la teatraj prezentoj de la junulara *Atlaspatoart* de la IJK-urbo Pato Branco (“La domo kiu timigis”) kaj la duopo Vida Jerman kaj Saša Filipovic (brazilaj poemoj kaj “Amo per proverboj”). Impona estis la danca spektaklo de la vaste konata ensemblo *Edisca*. La huma-

nisman edukadon de la Edisca-fondaĵo prezentis portugallingva filmo antaŭ la prezento kun – senantaŭaverte – anglalingva subteksto. Tamen ne estis multaj tiaj etaj konfuzsurprizoj en la kongreso, kiu estis orde organizita ekde rapida transdono de la dokumentoj ĝis komfortaj transportoj, kiuj tamen ne sukcesis plene kompensi la ĝenon de la granda distanco inter la ĉemaraj hoteloj kaj la kongresejo.

Dum la kongreso ni kleriĝis en prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato, en AIS-kurso kaj alimaniere. La esperantologia konferenco diskutis nian kulturon. La tago de la lernejo estis aparte riĉa kompanse al la neokazigo de ILEI-konferenco. “Diverseco – ŝanco, ne minaco” estis la kongresa temo. Menciindas du invititaj gastoj: José Carlos Morales, iniciatinto de la UN-jardeko de indiĝenaj popoloj 1995–2004, prezidanto de la Monda konsilio de indiĝenaj popoloj kaj de Indiĝenaj Dialogoj, kaj Patrick Gallaud, ĝenerala sekretario de la Monda federacio de UNESKO-klubo, asocioj kaj centroj.

Por UEA la kongreso estis ankaŭ signo de nova struktura etapo. Nova ĝenerala direktoro Trevor Steele organizis la landajn salutantojn ĉe la podio, apudis en la komitatkunsidoj kaj estris la kunsidon “CO respondas”, kie li malkaŝe rakontis pri la konsideroj por kaj kontraŭ eventuala translokiĝo de la sidejo. Nova revuoredaktoro Stano Marcek sekvis fervore la okazaĵojn, kaj nova libroservisto Ionel Onet laboris apud la pensiiĝonta Simo Milojevic. La antaŭa redaktoro de la Jarlibro, Francisco Veuthey, partoprenis ĉi-foje ne kiel stabano sed kiel simpla ĝuanto de Brazilo de kleraj, respektemaj homoj – kaj kiel redaktoro de *Folioj de Kat-amikaro*.

La Komitato de UEA ricevis de la Estraro promeson pri enrevua apero de korektoj kaj kompletigoj al la Estrara Raporto 2001 – kaj konklude la Komitato akceptis la raporton preskaŭ unu-



anime (tri sindetenoj). Aliflanke, per 17 voĉoj por kaj 13 kontraŭ, la Komitato akceptis la proponon de Mireille Grosjean, A-komitatanino por Svislando, tuj sendiskute voĉdoni pri la buĝeto 2003, tiel interrompante la demandojn kiujn mi, komitatanino A por Finnlando, jam komencis prezenti. Sekve la buĝeto, kiu interalie malaltigas la sumon por salajroj en la CO de 262045,85 eŭroj (rezulto en 2001) al 211000 por 2003 kun la klarigo ke “en 2003 estos malpli da oficistoj ol en 2001”, rapide estis akceptita de la Komitato.

Tamen la estraranino pri financoj Ans Bakker-ten Hagen bonvole strebis klarigi la buĝetajn aferojn en la antaŭa subkomitata kunsido dum kiu, bedaŭrinde, mankis tempo. Ŝi ankaŭ faris resuman klarigon sub la tagorda punkto “ceteraĵoj”. Interalie ni eksciis, ke la redaktora laboro ne plu estas buĝetita sub salajroj.

Elektiĝis nova Elekta Komisiono. Ĝi planas instigi al alelektiĝo de C-komitatoj kaj al preparo de la estrarelektoj en Pekino 2004. Voĉdonis 41 komitatanoj kun la jena rezulto: elektiĝis Edwige Tantin Ackermann (30 voĉoj), Povilas Jegorovas (29) kaj Takeuti Yosikazu (35); ne elektiĝis Symilde Schenk Ledon (17) kaj Anna Ritamäki (11). Por mi la EK-elektado estis

aparte interesa, ĉar mi penis esti kandidatigita laŭ la proceduroj de la elekta regularo. Marde mi transdonis al la EK-prezidanto mian prezentiĝon kaj kandidatigon subskribitan de du komitatanoj. Tamen dum la vendreda komitatkunsido, pro diversaj miskomprenoj, mia kandidatigo estis aldonita lastminute. (Nek mi mem nek la EK-prezidanto ĉeestis kiam la tagorda punkto estis ekstraktita.)

Kio do rezultis de la UK krom memore sonoranta brazila muziko kaj stako da kongresaj kureroj titolitaj *La Bela Songô de l'Omaro* (honore al la kongres-simbola besto)?

Restis iu baza sento de samtempe nove freŝa kaj plene tradicia kongreso, inspire fidele al nia historio. Teme tra la tuta kongreso ritmis ankaŭ *La Espero* de Zamenhof. Ferme kaj malferme ĝi estis kantita en sia kutima marŝa takto. Intertempe ĝi ankaŭ sonis, eĉ trifoje, kun noveca muzikstila freŝo de Lima, kaj, krome, kiel la ĉeftemo de la literaturanaliza prelego de Humphrey Tonkin. Iel, kvazaŭ mirakle, ne plu ŝajnis eksmoda la konvinko pri la efektivigo de la bela songô de l'homaro.

*Anna Margareta Ritamäki*

*Fonto: La Ondo de Esperanto, 2002, n-o 8-9*

## Rusiaj Esperanto-Tagoj

Rusiajn Esperanto-Tagojn (RET-02) oni aranĝis en Kovrov 14-25.08.2002. Ĝi estis interesa kaj grava renkonto por ĉiu partoprenanto, kaj escepte rara travivaĵo ĝi estis por la finna esperantisto. La urbo Kovrov situas en Vladimira regiono en la kerna parto de la vasta Ruslando. La najbaraj antikvaj urboj estas Vladimir kaj Suzdal, mondfamaj pro la grandaj monaĥejoj. Kaŭze de la milita industrio la regiono estis fermita dum la milito kaj multajn jardekojn poste. Estis striktaj vojaĝlimigoj, kiuj nun jam estis forigitaj. Mi vojaĝis trajne el Turku al Kovrov tra Moskvo.

En la vilaĝo Repniki kelkdekaj kilometroj for de la vera urbo Kovrov situas somera tendumejo Berjoŝka por infanoj. Tio estis la bazejo de RET. Ĝi estas konvena loko por trankvila laborado meze de la naturo, tamen ekipita kun bonaj ejoj por la prelegoj, kultura programo kaj loĝado. Ĉio estis bone organizita. La ĉefa organizanto estis Garik Kokolija, kiu ŝajne estas la prezidanto de la Rusa Esperanto-Unio. En la laboro lin helpis Andrej Grigorjevskij, Jelena Katajeva kaj Grigorij Arosejev kaj multaj aliaj gravaj aktivoj.

Povas esti, ke la RET estis plejparte celita nur por la rusaj esperantistoj, kaj tiel ankaŭ okazis. Tamen oni bone akceptis ankaŭ unusolan finlandanon, kiu preskaŭ lastmomente aliĝis. Eble mi estis la sola partoprenanto el ekster la eksa Sovjetio kaj la aliaj ekssocialismaj landoj. El Stokholmo venis Ĵomart kaj Nataŝa, sed ili ja estas eksaj sovjetianoj. Ili koncertis kaj certe estis tre amataj inter la amikaro.

La programo estis abunda. Mi eblis ĝui nur parton de ĝi. Plejparte mi aŭskultis la altkvalitajn kaj interesajn prelegojn de Nikolao Gudskov, kiu prelegis pri la movadaj kaj lingvaj aspektoj de Esperanto. En la libroservo mi aĉetis lian ĵus aperintan libron: Epitomo de Esperantologio. La diskutoj dum kaj post la prelegoj estis fervoraj. Mi aŭskultis ankaŭ la prelegojn de Grigorij Aro-

sejev pri la rusa literaturo kaj partoprenis la diskutrondon de Andrej Grigorjevskij.

Por doni komprenon pri la abunda programo mi citas la rusan Esperanto-gazeton REGO n:o 3, kiu i.a. jene informis pri la venontaj tagoj:

“Metropoliteno – tago de Varankin kaj E-literaturo; Fundamento de Esperanto – tago de Akuzativo kaj E-gramatiko; La bona lingvo – tago de la Stilo; Paŝoj al la plena posedo – tago de instruado; Esperanto en perspektivo – la interna kaj aliaj ideoj; Historio de la monda lingvo – tago de E. historio; Senĝenaj dialogoj – tago de aplikado; Tutmonda sonoro – tago de informado kaj varbado; Kредu min sinjorino – virinoj en Esperanto... ktp.” Do, por ĉiu tago estis la propra temo kaj ĉiumatene Jelena Katajeva prezentis kaj klarigis la tagan programon por post la matenmanĝo fronte de la ĉefdomo kunveninta publiko.

Krome la prelegoj kaj aliaj gravaj kunsidoj okazis ankaŭ malpli seriozaj okupoj kiel ekzemple kursoj en origamio, pentrado, tatara kulturo, danco, muziko kaj arta tranĉado laŭ betulŝelo, k.t.p. Estis aranĝita ankaŭ diversaj kvizoj kaj ludoj. Ĉion por ĉiu.

Jam pasintjare mi en BET-37 havis okazon aŭskulti la prelegojn de Miĥaelo Bronstein. Nun li prezentis ekzemplojn pri la tradukoj koncerne la unu kaj sama puŝkina teksto de ses tradukintoj, kiujn tradukojn li akurate kritikis. Finfine li prezentis ankaŭ sian propran tradukon. Miĥaelo estas ankaŭ lerta muzikisto, kaj li vespere koncertis prezentinte siajn proprajn kantojn kun la helpo de belaj kaj ĉarmaj knabinoj, kiuj certe lin inspiris.

Ĉar la programo estis abunda, okazis samtempaj prelegoj kaj aliaj koincidoj. Tial mi ne sukcesis ĉion ekhavi, eĉ ne la plej grandan parton de la programo, por ne paroli pri la ĉiuvespera kultura programo. Fakte estis ja mia intenco antaŭ ĉio konatiĝi kun la lokaj vidindaĵoj kaj cirkon-

stancoj kaj multe diskuti kun la rusaj esperantistoj por plibonigi mian interparoladan scion. Tion mi superabunde sukcesis fari. Mi konstatis, ke la lingvoscio inter la partoprenantoj estis tre diversa. Estis unu ĉefa grupo, kiu parolis eĉ mirinde fluan kaj altkvalitan Esperanton. Estis ankaŭ tiuj, kiuj ne havis la saman lertecon kaj estis ankaŭ komencantoj. Nuraj turistoj oni ne akceptis al la renkonto.

Sur la Kljasma-rivero, kiu fluas proksime de la bazejo oni organizis mallongan ŝipkrozadon. La tuttagan ekskurson mi partoprenis al la urboj Vladimir kaj Suzdal. La urboj apartenas al la ora ringo de la antikvaj urboj ĉirkaŭ Moskvo. La urbaj monaĥejoj estis imponaj. La renovigaj laboroj certe daŭros longe en kelkaj preĝejoj, kiuj suferis dum la sovjeta tempo, sed la plejmulto tamen estis savita. Ni havis ruslingvan ciceroninon kaj kelkaj esperantistoj tradukis al mi la plej gravan informon. En Kovrov mi unu tagon sole promenis kaj i.a. vizitis la doman muzeon de Vasili Aleksandroviĉ Degtjareff, la rusa armilevoluanto/inventisto, la heroo de la socialista laboro.

En la internacia vespero mi finne prezentis du

poemojn: *Nokturno* de Eino Leino kaj *Sua lemino* de Kaarlo Kramsu. La publiko, kvankam nenion komprenis, afable aŭskultis kaj mi ricevis sonoran aplaŭdon.

Mi forveturis el Kovrov jam la 24-an tagon, unu tagon pli frue ol aliaj, ĉar mi pro la malvarmo ne estis en la plej bona stato. Jam estis aŭtuno en Kovrov, kvankam en Moskvo la vetero daŭre estis varma, kaj en la sekva tago, kiam mi alvenis en Turku, la varmega vetero min surprizigis. – Vojaĝi eksterlanden sen paroli la laŭlandan lingvon ĉiam estas ia malgranda aventuro. Mi ĉiuokaze bone sukcesis kaj ne restis kiel eterne iradanta aŭ veturanta stranga vagabundo al sur la senfinaj stratoj aŭ fervojoj de la vastega Rusio.

La nombro de la partoprenantoj estis ĉ. cent, plejparte rusaj esperantistoj, kiuj venis eĉ el la plej malproksimaj urboj de Rusio, vojaĝinta milojn de kilometroj, eĉ du-tri tagnoktojn, por atingi la lokon.

Viktor Kudrjajtsev skribis pli longan referaton pri la tagoj. Tion oni eblas legi en la reta paĝo <<http://ret02.by.ru>>.

*Bruno Lehtinen*



*Partoprenantoj de Rusiaj Esperanto-Tagoj 2002. (Foto: Bruno Lehtinen)*

## IKBE-68 en Hungario

La 68-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis en Balatonlelle, Hungario 20.-27.7.2002. Jam trifoje antaŭe hungaraj blinduloj organizis kongreson: en 1929, 1966, 1983. Ĉi-jare en Balatonlelle kunvenis reprezentantoj el 16 landoj por diskuti, kiajn obstaklojn blindeco kaj viddifektoj kaŭzas al individuo en la nuntempa socio.

La serion de ok prelegoj komencis Arvo Karvinen pri temo "Kaŭzoj de blindeco en Finnlando". Kiel konsultan literaturon li uzis la jarraporton 2000 de la finna registro de vidhandikapoj. Tiu registro estas laŭleĝa registro, kiu funkcias ekde januaro 1983. La finna Federacio de Vidhandikapitoj prizorgas ĝin praktike. Arvo Karvinen konstatis, ke dum la lasta jarcento la kaŭzoj de blindeco ŝanĝiĝis. Dum la funkciado de la registro la proporcio de infanoj, junuloj kaj laboraĝaj en la freŝaj jarraportoj malkreskis kaj respektive la proporcio de maljunuloj kreskis. La statistiko montras hodiaŭ, ke la plej ordinara kaŭzo de ĉiuj viddifektoj estas la kresko de aĝo, 43,6 %. La dua kategorio estas heredaj kialoj, 14,7 %, la tria kategorio neŭrologiaj kialoj 12,2, la kvara kategorio gravidecdevenaj 10,3 %, la


kvina kategorio diabeto retinopatio 9,2 %, la sesa kategorio glaŭkomo, kiu ankoraŭ en la jaro 1962 estis dominanta kaŭzo, nun falis al 7,9 %. Akcidentoj kaŭzas nun 1,8 % de viddifektoj, ankaŭ akcidentoj dominis en la statistikoj antaŭ 40 jaroj.

La prezidanto de la kongreso, muzikinstruisto Attila Varró prelegis pri la ĉiutagoj de blindulo kaj kiel li instruas muziknotacion kaj la brajlon. Czaba Ecsedi parolis pri informadiko kaj la blinduloj en Hungario. Antun Kovac el Kroatio asertis en sia prelego, ke blindeco ne estas la plej malfacila handikapo. Esploristo Blazio Vaha kaj doktoro Ödön Bodor konatigis 93 eksterlandajn gastojn ĉe Balatono kun la hungara lingvo kaj vivo.

Dum la kongreso Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), kunvenis por pritrakti i.a. modernan komunikadon inter blinduloj trans la limoj pere de Esperanto. La prezidanto de LIBE estas Theodor Speckmann el Germanio.

La sekvonta IKBE okazos en Gotenburgo kongrue kun la 88-a UK.

*Ritva Sabelli*



*Dum la kongresa semajno eblis ankaŭ iom ludi. Kuraĝaj blinduloj uzis la grandan akvan glitejon (tobogano) kun du lognaj kaj unu rekta, rapida vojo por plonĝi en basenon.*



## Efektiva lingva egaleco, rajto de la eŭropanoj

La temo por la kvina Eŭropa Esperanto-Kongreso en Verona fine de aŭgusto estis Efektiva lingva egaleco. Pri la temo estis prelegoj kaj diskutoj. En sia parolado dum la malfermo Humphrey Tonkin konstatis ke la lingva egaleco praktike ne funkcias. Li diris i.a.:

“Jes, teorie la finna estas samrajta kun la franca, sed en la praktiko oni ne uzas la finnan en kunsidoj, en kiuj oni celas efektive konvinki la aliajn ĉeestantojn, interalie ĉar buĝetaj limigoj limigas la utiligon de interpretado el la finna entute.

Sed ĝuste pro la manko de influo de la malgrandaj lingvoj, la finnoj kaj grekoj kaj eĉ italoj fariĝas pli kaj pli kapablaj en la angla lingvo. La germanoj kaj la francoj nun devas rezisti ne nur la influon de la denaskaj parolantoj de la angla lingvo, sed tiun de la parolantoj de la malgrandaj lingvoj, kiuj jam rezignis pri la propraj lingvoj interalie ĉar la francoj kaj germanoj ne pretis defendi ilin. Tiel, do, la lingvoj de la dua rango estas nun minacataj de la angla unuflanke kaj de la bonaj uzantoj de la angla kiel dua lingvo aliflanke.”

Tonkin kiel solvon vidas nur ke la francoj aŭ germanoj komprenus, ke la plej bona vojo por konservi la aŭtonomion kaj influon de la propraj lingvoj estas limigo de la rolo kaj etendiĝo de la angla per subteno de neŭtrala solvo. Sed tio postulas ke ni esperantistoj helpos mobilizi la publikon ĉirkaŭ tian politikon.

”Se vere la diversaj nacioj volas konservi la Eŭropon de la kulturoj, ili aŭskultu la mesaĝon interalie de ni esperantistoj, kiuj jam de pli ol unu jarcento praktikas komunikadon kiu unuecigas la homojn en spirito de egaleco kaj konservas la lokan kaj regionan kulturan diversecon. Ĉu eta bando de utopiistoj aŭ antaŭanoncantoj de la nova Eŭropo? Tiu elekto, karaj kongresanoj, restas ĉefe ĉe ni. Ni ne hezitu antaŭ tiu

nova kaj unika defio.”

Dum la kongreso oni elektis novan estraron por Eŭropa Esperanto-Unio. Nova prezidanto estas Seán Ó Riain, Irlando/Germanio; vic-prezidanto Flory Witdoeck, Belgio; kasisto Johann Derks, Nederlando kaj sekretario Katinjo Fetes-Tosegi, Aŭstrio. Gravan taskon en la EEU-laboro havas ankaŭ Dafydd ap Fergus aŭ David Ferguson kiel ĉefo por la Brusela Komunikadcentro.

La venontan EEU-kongreson Hispana Esperanto-Federacio organizos en la jaro 2004 en Hispanio, en Bilbao.

*Carola Antskog, komitatano de EAF*

## Nuoret oppivat Esperantoa

Raportit EAF Agadas -listalla ovat kertoneet nuorten ihmisten halusta oppia esperantoa. Kouluikäisiä osanottajia on ainakin Haapavedellä, Kemiössä ja Tampereella. Kaikille 16-vuotiaille ja nuoremmille on luvassa mahdollisuus osallistua Euroscola-matkaan keväällä 2004 tai myöhemmin. Vaaditaan lukionmittainen kurssi, joka monella paikkakunnalla hyväksytään lukiokursina. Ensimmäinen osa sellaisesta kurssista järjestetään Kemiössä marraskuussa.

Aika: 23.-24.11, saapuminen 22.11 illalla (Helsingistä 17.15, Turusta 18.10 tai 20.55)

Paikka: Källkullen, Kemiö

Hinta: Opetus, oppikirja (Mazi en Gondolando) sekä täysihoito 53 EUR.

Ilmoittautuminen ja muut tiedot: Carola Antskog, 25700 Kemiö, puh. 050-5817272, sähköposti: <[cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)>.

Antakaa tiedot eteenpäin tuttavapiiriin nuorille!

*Carola Antskog  
ELFIn puheenjohtaja ja  
Euroscola-projektista vastaava*

## **Sukcesis la unua Balta Esperanto-Forumo**

La unua Balta Esperanto-Forumo okazis 14-18 aŭg 2002 en Kaliningrad. Ĉi tiu forumo estis, verŝajne, la plej internacia el ĉiuj aranĝoj, kiujn organizis ruslandaj esperantistoj. Inter la 123 aliĝintoj (el ili 113 reale partoprenis) el 12 landoj, estis nur dudeko da ruslandanoj.

La forumanoj konatiĝis kun Kaliningrad/Königsberg, interalie, per prelego de Wolfgang Kirschstein. Aliaj prelegoj estis dediĉitaj al Vladimir Varankin kaj ties “Metropoliteno” (Aleksander Korĵenkov), “Eŭgeno Onegin” de Puŝkin (Valentin Melnikov prezentis fragmentojn el sia traduko), korupto en Pollando (Maciej Wnuk), regiona kunlaboro en Nordio (Kalle Kniivilä), ekologio de la Balta Maro (Ingvar Enghart), rilatoj inter Ruslando kaj Ĉeĥio (Zdeněk Polák). Diverslandaj partoprenantoj faris raportojn, proponojn kaj demandojn en la seminario “Esperanto en Baltio”.

Kadre de BEF-1 okazis seminario pri literatura kritiko, kiun preparis Wolfgang Kirschstein. Pluraj forumanoj profitis la unuataĝan oferton de eldonejo “Sezonoj”, kiu lanĉis la unuan volumon de la kvinvoluma verkaro de Fjodor Dostojevskij en Esperanto.

La streĉan laborprogramon agrable variigis interkona vespero, kant-koncerto de studio “Lira” kaj kviza vespero de Marian Zdankowski. La duontaga ekskurso kondukis al ĉarma banurbo Svetlogorsk (Rauschen).

La Forumo altiris atenton de amaskomunikiloj. En la aperintaj gazetoj, radioj kaj televida raportoj estis akcentita la rolo, kiun povas havi esperantistoj, kiel internacia neregistara movado, en la kontaktoj inter Ruslando kaj Eŭropa Unio.

Pluraj partoprenintoj pledis por okazigo de la dua BEF en la sama urbo post unu jaro.

*Halina Gorecka*

## **Kansainvälinen Rauma 5. - 8.9.2002**

Rauman kaupungin kulttuuritoimi järjesti teemavuoden ”Kaupunkielämää vuodesta 1442” puitteissa näyttely- ja tapahtumaviikonlopun, jossa kaupunkilaisten, sen yhteisöjen ja yritysten kansainväliset yhteydet pääsivät esittäytymään. Mukana oli 37000 asukkaan kaupungin vain muutaman sadan uussuomalaisen omia yhdistyksiä, ystävyysseuroja, oppilaitoksia, seurakuntia; suuret vientiyritykset esittäytyivät kaupungintalon valtuustosalissa, kansalaistoiminta kulttuuritalo Posellissa. Sain kutsun suunnittelukokoukseen ja kaiken tuen ja tekniset apuneuvot laatiessani pienen esperanto-osaston yhdelle pöydälle ja kahdelle ilmoitusseinälle sekä TV-ruudulle (Mazi esittäytyi). Julistekokoon suurennetut esittelytekstit ja muutamat kuvat sekä lehdet ja kirjat, äänitteet antoivat kuvaa suunnitelmakielestä ja sen kulttuurista. Kommentti-viikkoon tuli muutama rivi. – Aineisto on tallella ja helposti käytettävissä missä vain annetaan palanen pystysuoraa näyttelytilaa käyttöön.

Rauman kansalaisopistossa alkoi syyslukukauden mittainen esperanton johdantokurssi 26. syyskuuta.

*Tuomo Grundström*

## **Lingvotagoj festas lingvojn**

Laŭ propono de Konsilio de Eŭropo, tuta Eŭropo festas la 26an de septembro kiel lingvotagon ĉiujare.

Por sukcesigi tiun iniciaton por lingvolernado kaj lingva diverseco ankaŭ esperantistoj povas kontribui – aŭ verŝajne devas kontribui, ĉar nur tre malmulte videblis la tago ĉi-jare. KdE mem ne donis apartan buĝeteron por ĝi ĉi-jare. Eŭropa Unio ne aliĝis al la iniciato kaj en la edukministrejoj oni verŝajne traktis la aferon kiel rutinaĵo inter multaj.

EAF ricevis kelkajn lingvotagajn afiŝojn. Iuj kluboj en Aŭtunaj Tagoj ricevis tian afiŝon, uz-eblan ankaŭ en la sekvaj jaroj.

Krome ni povas kontribui al la sukcesigo de la patrinlingvatago de Unesko la 21an de februaro.

Pli da informoj pri ambaŭ tagoj rete ĉe:

<<http://www.groups.yahoo.com/group/lingvotagoj>>

La retliston Lingvotagoj kunordigas kaj raporton pri nia agado kompilas: A M Ritamäki, Dragsfjärdsv. 690, FI-25700 Kimito, <[anna.ritamaki@kolumbus.fi](mailto:anna.ritamaki@kolumbus.fi)>.

### Internacia Fotokonkurso

Post kvar sukcesaj konkursoj (1998-2001) la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la kvina Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10x15 cm. Fotoj povas esti koloraj kaj nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devas atingi la sekretarion antaŭ la 15a de decembro 2002.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: 50 eŭroj kaj abono al "La Ondo de Esperanto"

2a premio: 25 eŭroj kaj abono al "La Ondo de Esperanto"

3a premio: abono al "La Ondo de Esperanto"

Specialan premion (libroj de "Sezonoj" kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2004 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

[Halina Gorecka]

### Avo Frosto en Kanado respondas ankaŭ en Esperanto!

La finna jululo havas fraton en Kanado. La frato nomiĝas Avo Frosto kaj li ĉijare promesis respondi leterojn ankaŭ en Esperanto. La Esperanto-Societo Kebekia (ESK) invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj skribi al Avo Frosto. ESK esperas ke esperantistoj tra la mondo volas helpi al infanoj skribi leterojn al:



Avo Frosto  
Norda Poluso  
HOH OHO  
Kanado – Canada

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

### Esperanto-Gården festas novjaron internacie

Karaj gesamideanoj!

Vi estas kore bonvenaj festi jarfinon ĉe nia esperanta hejmo en Lesjöfors, Svedio. Nia ideo estas ke opuloj aŭ pli aŭ malpli grandaj grupoj prezentu ion tipan por sia nacio, ekzemple:

*Popolkostumojn*

*Muzikon – kantojn, diskojn k.sim.*

*Manĝaĵojn*

*Artajn programerojn*

*Krome: loterio, libroaŭkcio kaj pli, laŭ ideoj de la ĉeestantoj*

Je via dispono: bone ekipitaj kuirejoj, piano, stereofonia instalaĵo, salonoj de diversa grandeco.

Tranokto en du- aŭ plurlitaj ĉambroj. Modestaj prezoj. Restoracio.

Estus tre ĝoje se ni estus multaj kaj farus ĉi tiun feston ĝojplena, enhavriĉa kaj amikeca tradicio.

Pliaj informoj kaj anoncoj: Melita Dörr, Hagensdalsvägen 25, SE-69230 Kumla, telefono: +46 19 58 32 52; E-poŝto <medor@swipnet.se> aŭ <egarden@esperanto.se>.

## Vintraj Tagoj kaj Aŭtunaj Tagoj 2003

Klaras la datoj por la sekvaj Vintraj kaj Aŭtunaj Tagoj de EAF.

Vintraj Tagoj okazos 22-23 marto 2003 en Lahti, en la popolaltlernejo (kansanopisto). La Aŭtunaj Tagoj okazos 13-14 septembro 2003 en Raŭmo, eble en la konstruata biblioteko kun la centra okazejo, sed tio ankoraŭ ne estas klara.

Por ambaŭ eventoj ankoraŭ mankas la temo kaj programo. Ideoj bonvenas. Kontaktu la prezidanton aŭ iun ajn estraranon! La semajnfinojn 9-10 novembro la estraro seminarikunsidos kaj tiam ankaŭ okupiĝos iom pri la planado de la renkontiĝoj. Se vi havas ideojn kiel ligi la temojn de la renkontiĝoj kun iu pli vasta projekto, ekz. lige al informado, tiuj ideoj estas speciale bonvenaj.

Aldone, memoru ke EAF ankaŭ sekvajare okazigas esperantokurson kunlabore kun la popolaltlernejo de Valamo. Tiun kurson ni okazigas 14-18 julio 2003, la semajnon tuj antaŭ la Internacia Junulara Kongreso en Lesjöfors, du semajnojn antaŭ la Universala Kongreso en Gotenburgo.

(amr)

# 88-a Universala Kongreso de Esperanto

Gotenburgo, Svedio  
26 julio - 2 aŭgusto 2003

De Kongresa komuniko 1 de UEA, redaktita por finnoj de via prezidanto. (amr)

## Kongresa temo:

Lingvaj rajtoj kaj respondecoj.

## Kongresejo

Svenska Mässan estas moderna kaj multfunkcia kongresejo proksime de la urbocentro kaj de multaj hoteloj, facile atingebla de la flughavenoj, bushaltejo kaj de la publika transporto.

## Loka Kongresa Komitato

Jam de du jaroj funkcias provizora LKK, gvidata de Roland Lindblom, kiu jam duan fojon prezidas LKK-n (Stokholmo 1980 kaj nun). Aliaj membroj: Christer Lörne, vicprezidanto, informado; Andreas Nordström, sekretario, kongresejo, loĝigo, Nacia Vespero; Siv Burell, vicsekretario, Infana Kongreseto, Nacia Vespero; Ali Khoshmashraban, kasisto, komercaj aranĝoj; Britta Rehm, vickasisto, ekskursoj; Margareta Andersson, diversaj taskoj; Anna-Lena Eriksson, junularaj aranĝoj; Lovisa Gustafsson, junularaj aranĝoj; Kaisa Hansen, kongresejo; Inga Johanson, loĝigo, amasloĝejo; Christer Kiselman, sciencaj aranĝoj (rektoro de IKU); Franko Luin, informado; Aino Åberg, ekskursoj, Infana Kongreseto.

## Korespondado

Kongresanoj bonvolu ne skribi rekte al LKK, sed ĉiam al la Kongresa Fako de UEA, ĉe la Centra Oficejo de UEA, en Roterdamo. LKK mem ne povas respondi individuajn informpetojn de la kongresanoj. Bv. ankaŭ neniam skribi al la Kongresejo mem. Pri kotizpagado kaj similaj detaloj vi povas en Finnlando kontakti la ĉefdelegiton de UEA Heta Kesälä (kontaktinformoj p. 2).

**Informado**

Diversaj informoj pri la kongreso aperis jam en la Unua Bulteno kaj en la retpaĝoj de UEA ([www.uea.org](http://www.uea.org)).

**Kongresa afiŝo kaj glumarkoj**

Bela kolora kongresa afiŝo (A1) estas havebla ĉe la Centra Oficejo, kontraŭ pago de sendokostoj (3 EUR). Kongresaj glumarkoj estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA (1 folio kun 12 markoj) kontraŭ 1,2 EUR (plus la sendokostoj). Heta Kesälä povas helpi vin ankaŭ pri tio ĉi.

**Infana kongreseto**

La infana kongreseto okazos en kabanaro, en bela apudlaga loko, meze de naturo sed ja proksime de Gotenburgo. Infanoj E-parolantaj, 3-

13 jaraj, estas bonvenaj. Detalaj informoj kaj aliĝoj ĉe: Stefan MacGill, Bethlen G. u.2, HU-2030 Erd ([Stefan.MacGill@galamb.net](mailto:Stefan.MacGill@galamb.net)).

**Aliĝoj**

Ĉiuj individuaj membroj de UEA kaj la kongresaj perantoj ricevis la aliĝilojn. Vi povas ankaŭ aparte peti ilin. La aliĝilo estas trovebla ankaŭ en la reto PDF-formate ([www.uea.org/kongresoj](http://www.uea.org/kongresoj)). Eblas ankaŭ aliĝi rete.

**Kotizoj**

Kotizoj ĝis la jarfino ekz.: Individua membro de UEA en Finnlando (IM) 150, ne-IM 190; IM-junulo/kunulo/komitatano/handikapito 75. Peranto en Finnlando estas Heta Kesälä.

## Internacia Junulara Kongreso

Lesjöfors, Svedio  
19 - 26 julio 2003

Kongresa temo: Al Libera Kulturo (ALKo)

Kongresejo: Esperanto-Domo en Lesjöfors kun apudaj domoj, interalie la Popola domo (Folkets hus).

Pli da informoj aperas en la retpaĝo <[www.tejo.org/ijk](http://www.tejo.org/ijk)>.

Aliĝilojn akceptas kaj pliajn informojn donas Hokan Lundberg, Fisksätra Torg 12, SE-133 41 Saltsjöbaden, Svedio, <[ijk.alighilo@tejo.org](mailto:ijk.alighilo@tejo.org)>.

Pagojn eblas prizorgi helpe de la ĉefdelegito de UEA.

**Vojaĝoj de Finnlando**

La redaktejo de Esperanta Finnlando volonte aperigas informojn pri kunaj vojaĝplanoj de Finnlando al IJK kaj UK. Ni ankaŭ volonte aperigas ilin en la retlisto EAF-agadas. (Aliĝoj al EAF-agadas plej facile pere de la prezidanto.)

## Ankoraŭ pri muzikaj terminoj

Mi dankas al A-L A-S, ke ŝi atentigis nin pri kelkaj muzikaj terminoj de homaj voĉoj! (EL 4/02).

Originale la vortoj soprano, tenoro ktp. estis la nomoj de la voĉoj, sed nune ili verŝajne en ĉiuj naciaj lingvoj signifas ankaŭ la posedanton de la voĉo, tiel eble ankaŭ en Esperanto. Mi trovis nur en unu el miaj E-vortaroj, en la hungara, pli longan formon, sopranulino, kian A-L A-S ne rekomendas.

Oni tamen iam povas substreki sekson per niaj esperantaj sufiksoj, ĉar oni devas memori, ke ankaŭ en knabokorusoj estas voĉoj soprano kaj alto. Same iam en geviraj korusoj oni miksas voĉojn tiel, ke iu virino kantas inter tenoroj aŭ kontraŭe.

Mi uzis en la artikolo pri Liisa Viinanen (EL 3/02) la samajn terminojn, sopranulino, tenorulo, kiujn uzis la verkintoj de la programkajeto de la opero.

*Jorma Toropainen*

## La estraro kunvenis

La estraro de EAF kunvenis en la oficejo en Helsinko la 20an de julio 2002. La kunsido daŭris de 11.20 ĝis 15.50.

Sub sciigoj la estraro interalie konstatis ke la informoj pri la novaj funkciuloj de EAF estas konfirmitaj de la asocia registro kaj notis la sukcesan turneon de Asorti (Elena & Edvard: Jelena Piščikienė & Edvardas Piščikas) kaj la aktivan agadon de FEJO.

La estraro decidis aranĝi la Vintrajn Tagojn 2003 en Lahti, loko Lahden kansanopisto (popolaltlernejo), prefere por 15-16 marto sed taŭgas ankaŭ 8-9 marto aŭ 22-23 marto. (Montriĝis poste ke por la popolaltlernejo eblaj datoj estis nur 22-23 marto.) En la programo estu almenaŭ vizito al Esperarto en Orimattila.

Aŭtunaj Tagoj 2003 estos en Raŭmo 13.-14.9.2003.

La lingvokursojn en la popolaltlernejo de Valamo 1.-5.7.2002 partoprenis entute 14 gelnantoj: 6 en la elementa kaj 8 en la daŭriga. EAF pagis la vojaĝkostojn de la eksterlanda instruisto, iom pli ol 450 eŭrojn. EAF donacis al la biblioteko de la popolaltlernejo la libron Hejma vortaro. Dum la semajnfino 5.-7.7.2002 ELFI okazigis seminarion por esperanto-instruistoj kun 5 partoprenantoj.

Venontjare la kursoj okazos 14.-18.7.2003 por ebligi tujan partoprenandon en IJK kaj UK en Svedio. Instruos Atilio Orellana Rojas, Carola Antskog kaj Tiina Oittinen, kiu estas ankaŭ la kursorespondeculo. La laborgrupo por la kursoaranĝoj estas la sama kiel 2002. EAF pagos same kiel ĝis nun la flugbileton de Atilio, aliaj kostoj estos pagita de Popolaltlernejo de Valamo.

La estraro ricevis la informon ke Indiĝenaj Dialogoj serĉas taŭgajn lokojn por aranĝi seminarion. Unu ebla loko estas Valamo, de kie Atilio petis oferton por majo 2003.

EAF por la dua sinsekva jaro ricevis subvencion de edukministrejo por Esperantolehti, ĉijare 1000 eŭrojn. La raporto pri la uzo de la sub-

vencio devas esti sendita ĝis la fino de aprilo 2003.

La estraro fiksas la jarkotizojn de Esperantolehti por 2003 sekve: abonprezo 15,00 •, por membroj 10,00 •, por memrosocietoj abonantaj al ĉiuj siaj membroj 9,25 •, por ordinaraj FEJO-membroj tra FEJO 7,60 •. (Altiĝis nur la ordinara abonprezo por ne-membroj, de 13,50 • ĝis 15,00 •.)

La subtenserva kontrakto por la librotenada programo (Unic compact) estas nuligita ĉar EAF momente ne bezonas ĝin.

La estraro konstatis, ke eblas financi semajnfinan seminarion de la estraro aŭtune 2002. Krom la estraro estos invititaj la ĉefdelegito de UEA kaj 1-2 reprezentantoj de FEJO.

La estraro diskutis pri eblaj projektoj kaj decidis plu esplori la eblecon lanĉi informadan projekton de EAF kun subteno de la Fondumo Esperanto.

La kasedo por Forsman-libro (Egaleco kaj paco per Esperanto, trad. Raita Pyhälä) pretas. Temas pri kopioj de la samaj kasedoj, kiujn Forsman produktis por la svedlingva eldono. La dua eldono de la libro estos presita aŭtune.

S-ro Jarmo Hietala el Kokkola informis tra Jukka Pietiläinen (per la adreso [prizorganto@esperanto.fi](mailto:prizorganto@esperanto.fi)), ke li faris en siaj hejmpaĝoj retan vortaron Esperanto-finna. De [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi) nun estas reta ligo al la vortaro.

La estraro rajtigis Carola Antskog esti la reprezentanto de EAF en la 5-a Eŭrop-Unia kongreso de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) 23.-28.8.2002 en Verona.

Pri la Universala Kongreso en Fortalezo, Brazilo la estraro decidis ke Anna Ritamäki salutu la kongreson por EAF. Krome la estraro diskutis la temojn pritraktotajn de la komitato kaj konkludis ke la A-komitato por EAF de UEA (Anna Ritamäki) dum la kunsido prioritatu la jenajn punktojn:

– La estrara raporto 2001 kiel presita en la junia numero de la revuo Esperanto devas esti korektita kaj kompletigita.

– La buĝeto por 2003 devas enhavi sufiĉajn rimedojn por la salajroj de sufiĉe multaj oficistoj, t.e. ne malpli ol en 2001.

– La A-komitato de EAF kandidatiĝos por la elekta komisiono.

EEU malfermis novan komunikadcentron en Bruselo kun dungito Dafydd ap Fergus. La centro informas kaj atentigas pri lingvaj aferoj. En Esperantolehti 3/2002 aperis artikolo pri la plendo de UEA ĉe Eŭropa mediatoro, pri kiu okupiĝis la nova centro. EEU volas instigi siajn membrosocietojn pagi pli al unio por kontribui al la centro. EAF-estraro decidis pri la kotizo pagota ĝis fino de la jaro.

La asocio pri homaj rajtoj kolektas nomojn de ĉiuj agantoj, kiuj laboras kontraŭ rasismo kaj havas multkulturajn projektojn. La sekretario informiĝos pri la eblecoj kaj donos la kontaktinformojn de EAF.

La estraro informiĝis pri pluraj leteroj alvenintaj al la oficejo. Reage al ĉenletero de Latvio la estraro konstatis, kaj decidis tion ankaŭ klare protokoli, ke la asocio ne subtenas disvastigadon de ĉenleteroj.

Sekvaj kunsidoj estos dum AT en Taivalkoski laŭ ebla horo kaj 9.-10.11.2002 kiel estrara seminario en Källkullen, Kimito.

La estraro de EAF kunvenis en la lernejo de Metsäkylä, Taivalkoski la 21an de septembro 2002. La kunsido daŭris de 19.08 ĝis 19.45.

Sub sciigoj la estraro notis la aktivan aŭtunan kursagadon en Finnlando, la kunsidon de la vortara grupo en Helsinko la 3an de novembro kaj la eventualan videbligon de agado en esperanto dum la anglalingva Unesko-konferenco pri interkultura edukado en Jyväskylä 15-18 julio 2003.

La estraro decidis aranĝi la Vintrajn Tagojn en Lahti 22.-23.3.2003. Lahden Kansanopisto (Popolaltlernejo de Lahti) sendis oferton, kiun la estraro akceptis.

Invalidiliitto ry informis al EAF, ke la lukontrakto de la stokejo en Niittymäentie, Espoo est-

as nuligita ekde 1.11.2002. La domo estos malkonstruata. Eblas havi pli da spaco en la stokejo de Vapaa-ajattelijat, kie jam estas malgranda stokejo de EAF. La estraro rajtigis la vicprezidanton kaj la kasiston aranĝi la aferon laŭ sia bontrovo kun helpo de aliaj lokuloj. La estraro klopodos poste trovi tempon decidi kion fari pri la aĵoj, kiujn EAF ne nepre devas deponi. Ekzemple jarkolektojn de eksterlandaj gazetoj oni volonte akceptus aliloke.

Synnöve Mynttinen, kiu ne ĉeestis mem la kunsidon, sendis por informo leteron de Simo Raumavirta de Fondumo Esperanto. La letero enhavis informojn pri antaŭa omaĝletero de EAF kaj Fondumo, planita de Vilho Setälä. La estraro konstatis, ke la ideo pri omaĝletero principe estas bona, sed ne apartenas en la plej prioritataj laboroj de la estraro. La ideo restos en listo de malfermaj aferoj.

La estraro notis ke la prezidanto raportis dum AT pri la UK en Fortalezo. Same Carola Antskog raportis pri la EEU-kongreso en Verono.

La esperantosocietoj de Salo kaj Turku vizitis Raŭmon la 14an de septembro. Ankaŭ la prezidanto kaj sekretario de EAF partoprenis kaj diskutis kun Tuomo Grundström kaj aliaj aktivuloj pri Aŭtunaj Tagoj 2003 en Raŭmo. La lokaj aktivuloj proponas la semajnfinojn 13.-14.9.2003, kion la estraro kun ĝojo akceptis.

Claus Günkel, kiu kunlaboris pri la kuirartaj eroj de la nova Plena Ilustrita Vortaro, promesis kontrollegi la kuirlibron tradukitan de Raita Pyhälä. Anna Ritamäki dum UK diskutis kun la libroservisto pri la vendado kaj reklamado de la kuirlibro pere de UEA. Krome ne okazis progreso pri la projekto. Verŝajne atendeblas ke la libro povos aperi ĝis la UK 2003.

La projekto de ELFI fari instrumaterialon por la Mazi-kurso iom progresas. Dum la aŭtuno Carola Antskog preparas materialon surbaze de la hispanlingva versio de Mazi.

La estraro serĉas novan prizorganton de la asociaj adresoj, ĉar Tapio Sormunen informis ke li ŝatus forlasi la taskon. La prezidanto rakon-

## Sur la nokta ĉielo

### Ursoj sur la ĉielo

En aŭtunaj vesperoj rekte norde troviĝas tre konata figuro de sep steloj. La figuro de preskaŭ egalbrilaj sep steloj estas tiom evidenta, ke oni ne povas taksu esti miro, ke multaj popoloj sendependaj de aliaj vidis la saman figuron kaj donis nomon al ĝi. Sed la objekto, kiun oni vidis en ĝi, diversas ĉe diversaj popoloj; almenaŭ plugilo, akvujo kaj ĉevaltirebla vagono troviĝas. Por finnoj ĝia nomo estas *Otava*, kaj mi uzas ĉi tie la saman, ĉar mi ne scias, ĉu iu aparta Esperanta nomo por ĝi ekzistas.

Por nuntempaj finnoj Otava signifas kutime nur nomon de la sep steloj, sed *otava* estas, aŭ iam estis, ankaŭ finnlingva vorto, kiu signifis iutipan fiŝkaptilon. Laŭ mia scio la formo de Otava similas la fiŝkaptilon tiel, ke la kvadrato de kvar steloj similas la reton kaj la tri steloj maldekstre de ĝi estas kiel tenilŝnuro de la fiŝkaptilo.

Tre ofte oni asertas, ke Otava estas la plej konata konstelacio. Tio estas tiel fuŝe, ke Otava estas tute ne konstelacio, sed asterismo. En astronomia terminaro konstelacio (*tähtikuvio*) estas precize difinita parto de la ĉielo; ekzistas entute 88 konstelacioj, kiuj kun siaj precize difinitaj limoj kovras la tutan ĉielon. Asterismo (*as-*

*terismi*) estas liberforma stelfiguro, per kiu oni povas memorigi lokojn de la ĉielo. Asterismoj povas esti diversaj en diversaj kulturoj, kaj oni povas eĉ inventi siajn proprajn asterismojn por siaj propraj celoj.


Otava estas parto de konstelacio Ursa Major (*Iso Karhu*). Ĝi estas figuro, kiu klare similas beston, kaj do ankaŭ ĝi estas ĉe diversaj popoloj sendepende konata. Pli-malpli hazarde indianoj en Ameriko same kiel eŭropanoj kutime vidis ĝin esti urso, sed almenaŭ alko kaj bovo estas aliaj en iuj tempoj en ĝi vidataj figuroj. La ursofiguro eĉ donis nomon al nordaj regionoj: urso estas *arktos* en la greka lingvo, kaj ĉar la konstelacio de urso videblas en la nordo, ni nuntempe parolas pri arktaj regionoj.

En aŭtunaj vesperoj Ursa Major estas malsupre apud la norda horizonto. Ĉar la veraj ursoj aŭtune iras al siaj vintraj dormejoj, kelkaj popolaj tradicioj trovis kutimon diri, ke tiam ankaŭ la ĉiela urso serĉas dormejon por la vintro. La popola tradicio ŝajnis ne tro zorgi pri la fakto, ke la ĉiela urso neniam trovas la dormejon. Pli malfrue vintre ĝi nur turniĝas pli kaj pli supre sur la ĉielo, ĝis ke ĝi printempe videblas rekte supre.

▷ tis, ke Pentti Makkonen sendis diversajn ideojn kaj informojn pri la registro.

La sekva kunsido okazos en Kimito/Kemiö semajnfino 9.-10.11.2002. La estraro decidis, ke EAF pagos al ĉiuj estraranoj (inkl. vicestraranoj) la vojaĝkostojn kaj tranoktadon kun manĝoj. Kiel la du reprezentantoj de FEJO aliĝis Mikko Mäkitalo kaj Timo Pirinen. Ankaŭ Heta Kesälä la ĉefdelegito ne UEA pozitive esprimis sin pri la invito.

*La jenajn raportetojn pri la estrarkunsidoj skribis la prezidanto utiligante la tekstojn de la sekretario.*







Strangaĵo tamen estas, ke la figuro de Ursa Major ŝajnas havi longan voston, kiun ursoj vere ne havas. Popolaj tradicioj elpensis diversajn klarigajn rakontojn pro tio. Unu de la plej amuzaj estas de la indianpopolo irokezoj. Laŭ tiu ĉiuj ursoj havis iam longan voston. La pratempa urso sur la tero provis kapti fiŝojn per sia vosto tra truo en glacio de lago. La truo tamen glaciĝis, kaj la vosto de la urso ankaŭ, kaj falis for. Tial nun la surteraj ursoj havas mallongan voston kaj nur la ĉiela urso plu la longan.

### Niaj stelaj najbaroj

Ni lasu la popoltradiciojn kaj ankoraŭ iom traktu la stelojn de Otava el astronomia vidpunkto, ĉar ili estas en iu senco interesaj. Multaj asterismoj nur aspektas esti grupoj de inter si najbaraj steloj, sed estas fakte steloj en tre diversaj distancoj, kiuj nur hazarde videblas en la sama direkto el nia planedo. La kvin mezaj steloj de Otava estas io alia: ili estas en proksimume la sama distanco de la Sunsistemo (*Aurinkokunta*), do ili estas vera najbargrupo de steloj, kunligata per gravitacio (*painovoima, gravitaatio*). Por esti preciza, oni nomas tiutipan grupon stelasocio (*tähti-assosiaatio*) por distingo de kelkaj alitipaj grupoj de steloj. La distanco de ili estas nur ĉirkaŭ 60 lumjaroj (*valovuosi*, la distanco kiun lumo iras en jaro, egalas proksimume 10 bilionoj kilometroj), kio signifas, ke ili estas ankaŭ preskaŭ najbaraj steloj de la Suno.

La distancoj de Dubhe (la supra dekstra stelo de Otava) kaj Alkaid (la plej maldekstra de Otava) estas iom, sed ne multe pli malproksimaj. Do vidu la stelojn de Otava, kaj pensu, ke vi rigardas niajn preskaŭ najbarajn stelojn! Ekzistas kelkaj ankoraŭ pli proksimaj, kun kiuj ni

konatiĝos en sekvontaj partoj.

Notu aparte la duan stelon de maldekstre, Mizar, kaj tuj apude la malpli brilan Alcor. Tiu stelparo estas konata dum longa tempo en historio, kaj estas iam dirata, ke homo, kiu vidas la stelojn Mizar kaj Alcor aparte, vidas bone. Tre malfacile videbla ĝi ne tamen estas, normale vidanta homo tute bone distingas la stelparon.

En spaco Mizar kaj Alcor estas ne tre proksimaj, Alcor estas multaj lumjaroj pli malproksime. Ĝi tamen estas ankaŭ per gravitacio ligata kun la supre menciita stelasocio. Fakte ankaŭ la Suno kaj multaj aliaj najbaraj steloj, videblaj en multaj diversaj direktoj ĉirkaŭ ni, apartenas al tiu asocio kaj moviĝas en la spaco samdirekten.

### La norda lumo

Spektante la nordajn konstelaciojn, ankaŭ atentu pri ebla ekzisto de la norda lumo (*revontulet*), kiu estas interesa kaj bela lumfenomeno en la norda ĉielo. Ĝin kaŭzas elektre ŝarĝitaj partikloj venantaj de la Suno kaj kolizantaj atmosferon de la Tero. Tre ofte ĝi videblas aŭtune ĝuste sur la konstelacio Ursa Major, kiu estas en la norda direkto ĉe alteco kutima por la norda lumo. En maloftaj okazoj norda lumo povas videbli ankaŭ rekte supre aŭ sude.

Iam estas malfacile scii, ĉu hela regiono en la nokta ĉielo estas norda lumo aŭ nubo, sed se ĝi ne kovras la stelojn en ĝia direkto, ĝi apenaŭ povas esti nubo. Tipaj formoj por la norda lumo estas vertikalaj strioj, kiuj ofte movas en periodoj de kelkaj sekundoj tien kaj reen. Tamen ĝi povas ankaŭ esti trankvila, nemoviĝanta lumregiono. La norda lumo kutimas havi verdan koloron, kiu tamen estas ne tre klara.

Estas maleble fari longajn prognozojn pri la nordaj lumoj. Oni tamen per spacoexploriloj povas trovi magnetisman aktiviĝon de la Suno tagon aŭ du antaŭ ol partikloj elĵetitaj de ĝi atingas la Teron. Tiam estas kreskiĝinta ebleco por okazi la norda lumo. Nuntempe oni ofte informas tion en ĝeneralaj radiaj kaj televidaj novaĵoj.

# Babilaĵo kun kuirejaj vortoj I

## Keittiösanastopakina I

Kiam Leena kaj Henriko decidis kune loĝi, ili rimarkis, ke ili bezonos multajn novajn aĵojn por la kuirejo. Ne estis facile. Ne nur la prezoj estis altaj, sed la vortostoko pri kuirejaj aferoj mankis al ambaŭ. Krome, la kuirarto kaj kutimoj estis malsamaj en ŝia kaj lia landoj. Ekzemple, li parolis pri askalonoj kaj aktinidioj, dum Leena parolis pri ŝalotoj kaj kivoj. Nur en la foiro ili vidis, ke askalono = ŝaloto<sup>1</sup> kaj kivo = aktinidio<sup>2</sup>. Ili ne povis samopinii, ĉu papriko vere estas papriko, aŭ eble kapsiko. Kaj ĉu brunaj ovoĵoj estas pli bongustaj kaj pli salubraj<sup>3</sup> ol blankaj? Kelkfoje ili ridis pri la miskomprenoj kaj alifoje ili koleriĝis, preskaŭ ploris.

Henriko preferus gasofornelon<sup>4</sup>, sed en la kuirejo de la nova loĝejo jam staras elektra forno. Li neniam aŭdis pri aerkirila forno<sup>5</sup>. Leena diris, ke ĝi estas utila, ĉar en ĝin oni povas meti du tri bakpletojn<sup>6</sup> samtempe kaj tiel ŝpari elektron. La enforna rostilo<sup>7</sup> feliĉe plaĉis al ambaŭ. Leena neniam antaŭe uzis premkuirilon/prempoton<sup>8</sup> (kiun la panjo de Henriko donacis al ili); ŝi unue timis ĝin, sed Henriko diris, ke preskaŭ ĉiuj en lia lando uzas ĝin por ŝpari tempon kaj energion. Vazlavmaŝinon<sup>9</sup> ili decidis ne aĉeti, sufiĉas ja broso<sup>10</sup>, lesivo<sup>11</sup> kaj fluakvo<sup>12</sup>. La lavtablo<sup>13</sup> de la nova kuirejo estis iom tro alta por Leena, kiu estas malalta virino. La suprajn bretojn<sup>14</sup> de la ŝrankoj<sup>15</sup> ŝi ne atingos sen ŝtupareto<sup>16</sup>. La elgutiga ŝranko<sup>17</sup> mirigis Henrikon, li decidis nomi ĝin elgutigejo. Li pensis, ke neniam plu li viŝos ujaron<sup>18</sup> per viŝtu-

ko<sup>19</sup>. Kaj neniam antaŭe li vidis pivotigan kranon<sup>20</sup>, el kiu fluas varma kaj malvarma akvo kaj kiu eĉ enhavas termostaton. Tre bone! La gejunuloj estas verduloj. Ili aĉetis tri rubsitelojn<sup>21</sup>: unu, pedalrubujo<sup>22</sup>, por kompoŝtendaj restaĵoj, alia por bruligeblaj<sup>23</sup> ruboj kaj la tria por metalaĵoj, vitraĵoj ktp. La kuirejo jam havas mikroondofornon (kiun Leena obstine nomas "mikro") kaj grandan fridujon<sup>24</sup>, sed ĉu ili bezonos frostigilon<sup>25</sup>? Okazis disputo, ĉar Henriko nomis ĝin kongelujo<sup>25</sup> kaj Leena glaciŝranko. Poste ili decidis nomi ĝin frostigilo. En ĝin ili povus konservi la berojn kaj legomojn, kiujn kultivas la gepatroj de Leena en la kamparo. Kompreneble ili bezonas ankaŭ tablon kaj seĝojn, sed kiukolorajn? La kurtenoj<sup>26</sup> devas kongrui<sup>27</sup> kun ili, same la tapiŝo. (Sed Henriko diris, ke en lia lando oni preferas sentapiŝan plankon!) Venontfoje ni faros aŭ aĉetos donacojn por Henriko kaj Leena.

<sup>1</sup>salottisipuli, <sup>2</sup>kivihedelmä, <sup>3</sup>terveellisiä, <sup>4</sup>kaasuhella, <sup>5</sup>kiertoilmauuni, <sup>6</sup>(uuni)peltiä, <sup>7</sup>uuninsisäinen grilli, <sup>8</sup>painekattila, <sup>9</sup>astianpesukone, <sup>10</sup>harja, <sup>11</sup>astianpesuaine, <sup>12</sup>juokseva vesi, <sup>13</sup>tiskipöytä, <sup>14</sup>hyllyjä, <sup>15</sup>kaapit, <sup>16</sup>keittiöjakkara, <sup>17</sup>astiankuivauskaappi; *elgutigi* – valuttaa vesi pois, <sup>18</sup>astioita, <sup>19</sup>pyyheliina, <sup>20</sup>kääntyvä hana, <sup>21</sup>roskasanko, <sup>22</sup>poljinroskis, <sup>23</sup>palaville, poltettaville, <sup>24</sup>jääkaappi, <sup>25</sup>pakastin, <sup>26</sup>verhot, <sup>27</sup>sopia (väreiltään)

*Saliko*

# Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@esperanto.fi](mailto:ilkka.santtila@esperanto.fi) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ Sakari Kauppinen, [sakari@skau.pp.fi](mailto:sakari@skau.pp.fi)
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Matti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☐ [martti.pennanen@pp.phnet.fi](mailto:martti.pennanen@pp.phnet.fi)
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ [matti.wallius@pp.inet.fi](mailto:matti.wallius@pp.inet.fi)
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☐ [andromeda@koti.tpo.fi](mailto:andromeda@koti.tpo.fi))
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☐ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☐ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2002**  
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
1/2 sivua 400 mk	1/2 sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto  
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

---

## Trakalendare

Multegaj tagoj en la kalendaro estas dediĉitaj al bonaj aferoj. – Nia serio pri festo- kaj temotagoj daŭras.

*Kompilis Saliko*

### Novembro

**1.11.** Ni sciiĝu pri veganismo kaj respektu la principojn de veganoj!

**3.11.** En Japanio: Tago de kulturo.

**16.11.** Internacia tago de l'toleremo, iniciato de la UN. (Ĝuste ni, esperantistoj, devus pligi toleremon en nia medio.)

**17.11.** Monda tago de nefumantoj, sed kiel la fumantoj kaj nefumantoj toleru unuj la aliajn? (31.5. estas Sentabaka tago.)

**21.11.** Monda televidtago por antaŭenigi pacon, sekurecon kaj ekonomian kaj socian evoluon. Iniciato de la UN.

**22.11.** En Usono: Dankofesto.

**23.11.** En Japanio: Tago por danki al laborantoj.

**29.11.** Internacia tago por montri solidarcon al palestina popolo.

### Decembro

**1.12.** Internacia tago por memori pri malliberigitaj pacifistoj.

**2.12.** Tago por forigi sklavecon. (Kiajn gesklavojn ni nuntempe havas?)

**3.12.** Internacia tago de handikapitoj. UN.

**5.12.** Internacia tago de volontuloj kiuj strebas por ekonomia kaj socia evoluo. UN.

**6.12.** Tago de sendependeco de Finnlando. (La kalendaro Jaro de FEL nomas "itsenäisyyspäivä" Tago de nedependeco.)

**7.12.** Internacia tago de aviado. UN. (Ĉu per Esperanto oni povus eviti kelkajn aviadajn akcidentojn, kiujn estigas miskomprenoj pro angla lingvo?)

**10.12.** Tago de homaj rajtoj. UN.

**11.12.** Fondotago de UNICEF.

**15.12.** En 1859 naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof. Librotago de esperantistoj. Ni mendu kaj aĉetu librojn de niaj libroservoj!

**29.12.** Internacia tago de biodiverseco de la naturo. UN.

**31.12.** Silvestro.

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuun alussa. Jutut 15.11.2002 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2002 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.